

# la Espero

1991:5-6

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN

Temo:

## Esperanto en radio

Radio Suiza Internaci  
Rádio Suíça Internaci  
Sviza Radio Internaci  
إذاعة سويسرا العالمية  
30/9/90 - 30/3/91

# RADIO BEIJING



*Milada Szwedo kaj Andreo Pettyn de la esperanto-redakcio de Radio Polonia  
respondas leterojn de aŭskultantoj*

RADIO ÖSTERREICH



INTERNATIONAL

## ANONCETOJ

Esperanto-tröjor, vita, röda och gråa långärmade: 150:–. Vita kortärmade: 85:–. Samtliga med snyggt Esperanto-tryck på framsidan, storlekar: XL, L, M, S. Framt på 35:– tillkommer. Ring 0586/548 11 och fråga efter Anders.

Bezonas librojn, revuojn ktp: Esperanto klubo de Bajamo, Poŝtkesto 188, Bajamo 85100, Granmo, Kubo.

Esperantisto el Zairo en Svedio deziras kontaktigi kun svedoj: Fua Kuanza-Elo-Charles, Norrtuna Säteri, 646 00 Gnesta.

### Deziras korespondi:

54-jara elektroteknikisto: Viktor Jarošević, K.Marx 2-3, 228400 Daugavpils, Latvio.

54-jarulo pri vivproblemoj, politiko, kulturo, literaturo kaj naturo. Kolektas bildkartojn, eldonaĵojn en Esperanto: Valdis Gulbis, 229590 Libagi, Talsu raj, "Andumos", Latvio.

Nova membro de UEA en Rusio pri vojaĝoj, gastigado. Kolektas pm, bk: Anatolo Guk, Poĉtamt, P.O. Box 43, 347900 Taganrog, Rostovskoj obl, Sovet-Unio.

Mia filo bezonas ĉiajn teĥnikaĵojn por fariĝi terkulturisto. Mi aŭ miaj filinoj ŝatus labori somere por havigi monon por tio. Mi povas ekz. ripari domojn: Maris Jakobsons, Brivibas iela 84-5, 226001 Riga, Latvio.

## DONACOJ

Claes Göran Ingestedt, Vällingby, 200. Arvid Johansson, Huskvarna, 100.

**Klubo cent:** Olle Olsson, Lund, 100.

**Klubo mil:** N-ro 3: Bertil Bengtsson 1000. N-ro 4: Jan Milld, Västerhaninge, 1000.

**Je memoro de Martin Säther:** Suda distrikto 100.

### Heredaĵo:

Agda Olsson 157 328:10.

*Novaj donacoj estas bonvenaj al Svenska Esperantoforbundet, poŝtgiro 20 12-3.*

## La Espero

### Organ för Svenska Esperantoforbundet

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

**Redaktör:** Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Sättning:** Leif Nordenstorm, Per Aarne Fritzon

**Utformning:** Omnibus, Tyresö

**Tryck:** BodoniTryck AB, Stockholm 1991

**Prenumeration:** 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoforbundet.

## Esperantoforbundet

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08 -11 74 34

**Öppettider:** Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoforbundet

**Medlemsavgift 1991:** Direktansluten medlem 125 kr.

Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

## SEFs styrelse

**Ordförande:** Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen, tel. 08-777 41 75

**Vice ordförande:** Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby, tel. 0760-882 10

**Sekreterare:** Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91

**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05

**Styrelseledamot:** Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61

**Styrelseledamot:** Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52

**Styrelseledamot:** Haldø Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87

**Suppleant:** Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten, tel. 08 - 97 47 76

**Suppleant:** Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

## Esperantoförlaget

**Postadress:** Box 7502, 200 42 Malmö

**Besöksadress:** Möllevångsgatan 20B, Malmö

**Telefon:** 040-12 20 29

**Postgiro:** 578-5

**Telefontid:** 1 september - 15 maj; torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Expedition:** Wivi Nilsson

**Styrelsens ordförande:** Tomas Jansson, Storgatan 13, 753 31 Uppsala

## Enhavo

Anoncetoj	66
Donacoj	66
Prezidanto	67
Travivaĵoj en Estonio	68
Niaj aktivuloj:	
Roland Lindblom	70
Temo:	
Kiel aŭskulti esperantajn radioprogramon	72
Esperanto kaj germana elstaras en Radio Polonia	72
Sendu salutoj per la radio!	73
Radio Aŭstrio vigle eldonas	74
Pli ol 40 jaroj de radio en Svislando	74
Esperantaj radiostacioj	74
Radio Pekino en 38 lingvoj	75
Programoj kaj temoj	75
Tra la lando:	
Vizito de Tanzanio	75
Kongreso de kristanoj	75
Murdo en Esperantujo	75
Ŝtelistoj en Esperanto-Centro	76
Multaj ideoj en Falköping	76
Kluba ĝemeligo	76
Stellan Engholm en NE	76
Tra la mondo:	
Albanio eldonas revuon ... kaj Ukraino	76
Nia lingvo:	
La Akademio kaj ĝia revuo	77
Ordboken svenska-esperanto	77
Sveda esperanto-teatro en Latvio en 1936	78
Sankta Nikolao komprenas esperanton!	79
Por komencantoj:	
Moralajo	80
Ĉe danca vespero	80
Krucvortenigmo	80
Recenzoj	81
Medlemsavgifter 1992	84

## Prezidanto:

### Denove prezidanto, sed kun nova strategio

En 1978 mi estis novbakita prezidanto de SEF kaj la bakiteco daŭris ĝis en majo 1985, kiam Karin Lindquist transprenis la prezidantan martelon.

Denove tiu martelo kuŝas sur breto en mia hejmo kaj memorigas min pri la malfacila decido mia, ĉu ankoraŭfoje eniri la bakforon por fariĝi re-novbakita prezidanto.

Ĉar mi bone konas la SEF-estraranojn, mi sciis, ke mi sidos inter kompetentaj kolegoj, sed ĉu ili akceptus min? Mi demandis ilin kaj la respondo estis: Jes!

Nu, kion mi povas fari dum unu jaro? Ne multe, sed kelkaj ideoj troviĝas en mia kapo.

#### Kontinua ŝanĝiĝo

Dum 20 jaroj mi laboris sur la kampo de komerco inter vendistoj kaj aĉetistoj, kaj ne nur en Svedio. Mi vidis, kiel entreprenaj organizoj kontinue ŝanĝiĝas por fariĝi pli efikaj kaj pli sukcesaj sur la merkato. La konkurenco ĉiam ŝvebas super iliaj kapoj.

Alia kampo de senĉesaj ŝanĝiĝoj estas la politika. Ne nur en orienta Eŭropo, sed ankaŭ en Svedio. Ĉu tiuj organizaj kaj strukturaj ŝanĝiĝoj koncernas nin? Sendube jes – sed kiel?

Kio okazos en nia esperantomovado, se ĉiuj sociaj instancoj ŝanĝiĝos, sed ni ne? Ni ŝanĝis nenion en nia movada organizo. Ni havas sistemon kun SEF-estraro kaj kluboj, kaj ni renkontiĝas kongrese unufoje jare. Ĉiam "la sama proceduro kiel pasintjare".

Mi petas ĉiujn konscii pri tiu ĉi situacio kaj nia organiza formo. Ni devas adaptiĝi al la ekstera mondo se ni volas atingi ion kaj prosperi.

#### Membriĝu en UEA

Mi kredas, ke ĉiu el vi bone scias, ke esperanto estas internacia afero kaj fenomeno, sed nur kvinono el vi estas membroj de internacia organizo. Mi nun petegas vin kaj admonas al vi, kiam ni nun proksimiĝas al 1992: Fariĝu rekta membro de UEA kaj ĝuu poste la agrablan senton, ke vi estas intima ero de la internacia esperantomovado.

Se vi faris tiun paŝon, vi rapide kaj facile faris ion valoran kaj konkretan por esperantistoj en aliaj landoj. La sekva paŝo? Fariĝu membro de iu faka organizo, kiu interesas vin, kaj per tio – agu internacie.

**Rolando**

# Travivaĵoj ĉe najbaroj en libera Estonio

*En La Espero 6/1990, p. 80, vi povis legi pri vojaĝo al Tallinn kaj renkontiĝo kun estonaj esperantistoj. Jen nova raporto pri vojaĝo unu jaron poste.*

Ĉiuj niaj estonaj geamikoj estis tre interesitaj kaj tre ĝojis, kiam ni montris al ili niajn estonajn vizojn. Nia grupo estis la unua, al kiuj la estonaj vizoj estis stampitaj en Tallinn, la 17-an de septembro 1991. Historia evento!

Havi la eblecon viziti Estonion kelkajn semajnojn post kiam ĝi fariĝis libera lando estis vere interesa travivaĵo. Niaj estonaj geamikoj ĝojis kaj estis feliĉaj, sed tamen oni estis sufiĉe prudentaj en sia ĝojo. Oni diris, ke oni neniam scias, kio povos okazi. Ankoraŭ estas ĉ. 150 000 soldatoj en la lando, kaj sur la stratoj al la Katedrala Monto restas grandegaj ŝtonoj de la barikadoj konstruitaj la 19-an de aŭgusto.

## Loĝado en familioj

Nia grupo konsistis el naŭ personoj kaj ni loĝis duope en diversaj fami-

lio. Tiamaniere ni ekkonis diversajn mediojn en tri diversaj urboj. En Tallinn ni loĝis i.a. ĉe instruistoj, kiuj multe kaj interese rakontis pri la historio de Estonio, pri la 50-jara okupacio, pri la "kanta revolucio" de la lastaj jaroj, pri la estonteco, al kiu oni kun nova fido alrigardis, kvankam oni volis en la la momento esti prudentaj. Estis vere mirinda travivaĵo tiel esti gvidataj ĉe la mano de niaj geamikoj tra eventoj, pri kiuj ni hejme legis en la gazetoj kaj spektis en la televido. Subite ni troviĝis meze en la historio!

Kompreneble ni promenis en la malnova urbo, pri kiu la turismaj gvidlibroj diras, ke ĝi estas pli bela ol Visby. Certe ni sentis la vualojn kaj la mantelojn de la mezepoko volvitaj ĉirkaŭ ni pli proksime ol oni sentas en Visby. Por ke ni eĉ pli origine sentu la estonan medion ĉirkaŭ ni, niaj gastigantoj invitis nin al la Estona Teatro, kie ni vidis muzikalon bazitan sur *La printempo* de Oscar Luts. Ĝi temis pri la vivo en vilaĝo ekster Tartu dum la infaneco kaj kresko de la verkisto. La teatraĵo

i.a. montras la rilatojn inter rusoj, germanoj kaj estonoj en tiu tempo. Ni ankaŭ lernis, ke Oscar Luts estas la plej populara verkisto en Estonio kaj ke la libro *La Printempo* aperis en plej multaj eldonoj el ĉiuj estonaj libroj.

## Universitata urbo Tartu

Post vizito al la universitata urbo Tartu, kie oni nun denove inaŭguros la statuon de Gustav Adolf la 2-a, ni tranoktis ĉe sciencistoj, kiuj laboris en Tõravere, la dua plej granda observatorio de iama Sovetunio. Kiam malheliĝis vespere, ni povis "rigardi la stelojn" tra la granda teleskopo. Super ni fermiĝis kaj malfermiĝis la tegmento de la observatorio. Ni ankaŭ admiris la montojn kaj valojn de la luno.

Post tiu ĉi moderna laborvilaĝo, kiu ankaŭ kunlaboris kun universitatoj en okcidenta Eŭropo, ekz. en Aŭstrio, ni vizitis la monaĥejon Peterseri. Ĝi situis kelkajn kilometrojn trans la limo al Rusio. Ni do pasis novkonstruitan barilon, kiun al ni malfermis blu-uniformita estona



*Gaste ĉe amikoj en najbara Estonio*

lingardisto.

La monaĥejo en Petseri estis mirakla vidaĵo kun siaj bluaj bulbaj kupoloj ornamitaj per brilaj steloj. En la bela korto plena de ikonoj, floroj kaj en la mezo fonto, la monaĥoj rapidis tien reen en siaj longaj vestoj. Kiam oni foje alvenis kiel novico al la monaĥejo, oni povis vivisian tutan vivon tie. La monaĥejo estis prizorgata per enspezoj de la kultivado kaj vendado de legomoj ktp. Kiam oni fariĝis maljuna kaj mem bezonis prizorgadon, oni povis loĝi en la maljunulejo de la monaĥejo: fine oni estis portita al groto, kiu entenis tombojn, kiujn la monaĥoj permane mem elfosis dum siaj vivo.

En la idilia ĝardeno urbeto Viljandi ni ekkonatiĝis kun la grandiozaj ruinoj de la iam plej potenca kruckavalira fortikaĵo en Baltio. Krome ni vidis la plej grandan teatron de Estonio (kaj tuta Baltio), kie oni ĵus fariĝis pretaj prezenti *La reaperintojn* de Ibsen. Oni prezentas multe da okcidentlandaj teatraĵoj en la estonaj teatroj.

Pärnu, kiu iam ludis la rolon de Hanso-urbo, montris tiuepokan domon en korto ĉe la ĉefstrato. en alia korto staris "la Sveda Turo", kiu apartenis al la fortikaĵoj en la 17-a jarcento. La bastionoj en la malnova fortikaĵo portis nomojn de diversaj planedoj. Sed nun ili estas uzataj kiel scenejoj por kantoprogramoj kaj teatraĵoj. La aŭtuna suno sekvis nin, kiam ni promenis sur la ĝuinda sabla strando en kio estis iam unu el la plej luksaj libertempaj urboj ĉe la Balta Maro. Oni nun prepariĝas repreni tiun lokon.

Estis la Esperanto-Asocio de Estonio, kiu aranĝis la vojaĝon en estonio kaj kiuj gastigis nin. De la sveda flanko ĉiu kontakto estis farita per esperanto. Inter la grupanoj estis kaj parolantoj kaj ne-parolantoj de esperanto. Ni do uzis diversajn lingvojn.

Post la semajno en Estonio ni kun granda ĝojo sentis, ke ni ricevis novajn bonajn geamikojn kaj ke ni ekkonis najbaran landon.

**Kerstin Rohdin**

## La Espero en 1992

La eldondatoj por La Espero dum 1992 estos proksimume:

Limdato por materialo		Aperdato
N-ro 1	17-a de januaro	26-a de februaro
N-ro 2	14-a de februaro	25-a de marto (informa numero)
N-ro 3	1-a de junio	8-a de julio
N-ro 4	15-a de aŭgusto	24-a de septembro
N-ro 5	12-a de septembro	22-a de oktobro
N-ro 6	17-a de oktobro	26-a de novembro

Memoru ke malfruaj manuskriptoj malfruigas la revuon!

## Annonsera i La Espero enligt följande villkor:

Helsida	3.000 kr
Halvsida	1.600 kr
Fjärdedelssida	900 kr
2 spalter x 6 cm	600 kr

På ovanstående priser får esperantoklubbar och medlemmar 50 % rabatt.

Småannonser kostar tio kronor per rad. Lägsta kostnad är dock 50 kr. Högst tio rader per person och tidskriftsnummer. Annonser beställs hos redaktören.

Redan nu kan ni anmäla er till

## Kongressen i Wien 25 juli-1 augusti 1992.

Kongressavgiften i svenska kronor:

Kategori	till 911231	från 920101	från 920401
Direktmedlem i UEA (ej MG)	600	745	890
Ej direkt medlem i UEA	745	890	1035
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1992-01-01), direktmedlem i UEA	310	450	600
Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är direkt medlem i UEA	450	600	745

Beställ anmälningsblanketter hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress.

All betalning sker till: pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad som avses.

# Roland Lindblom

Premsonĝo por intervjuanto ja estas alfronti intervjuaton, kiu respondas nur "jes" aŭ "ne" kaj poste sfinkse silentatadas kaj tiel nultempe elĉerpigas la demandojn.

Tia ne estas Roland Lindblom.

### Koncize

Jen, tute mallonge, pri la persono Roland Lindblom:

Komencis antaŭ 60 jaroj. Tiam li estis naskita. En Alingsås. Jam en 1948 li ekis pri esperanto, pro lingvointereso kaj korespondemo kun eksterlando. En junulara grupo ili ĉiusemajne konkurence konkuris pri enkapigo de novaj vortoj. Do, kiam li post ok jaroj vizitis sian unuan UEA-kongreson, li jam sufiĉe bone sciis esprimi sin verdlingve.

Poste RL partoprenis plurajn aliajn UEA-kongresojn, antaŭ ol li en 1990 venis al Kubo kaj premis la manon de Fidel Castro.

Ekzemple li estis en Vankuvero 1984. Tie li trovis BooMee Kim el Koreio. Ŝi nun loĝas kun Roland en Haninge kaj bele esperanto-parolas.

RL do ne eternis en Alingsås. Post sia soldatservo, dum kiu li fariĝis serĝento, li translokiĝis unue al Trollhättan, kaj poste al Nynäshamn. Tie li studis, fariĝis inĝeniero kaj trovis laboron ĉe Televerket. De 1982 li loĝas en Haninge.


Pri RL oni povas ankaŭ mencii, ke li membris en la granda ĵazbando de Nynäshamn, ludante trombonon kaj kontrabason.

### La orbito rolanda

Sed verŝajne vin plej interesas legi pri la orbito de RL kiel movadaktiva verdulo. Jen ankoraŭ kelkaj faktoj:

Unue li estis prezidanto de loka klubo en Alingsås, kaj poste de la SEF-distrikto por okcidenta Svedujo.

Baldaŭ li eniris la SEF-estraron



kaj kiam Jan Strönne en 1978 – post 29 jaroj – ekis kiel prezidanto, RL estis petita transpreni la prezidantan martelon.

En 1983 li krome estis elektita al la UEA-estraro. Verŝajne je sia propra miro:

– Mi ne komprenas kial, sed fakte tio okazis.

Sur la SEF-prezidanta seĝo li ne algluiĝis, sed ĉesis martelsvingi jam en 1985. (La SEF-kongreso 1991, tamen, denove surseĝigis RL-on. Li do nun denove estas nia prezidanto.)

Eblus diri multon pli pri la verdmovada aktiveco de Roland Lindblom, pri lia kvazaŭ mania fondado de novaj kluboj. Sed tio ne okazos, ne en ĉi tiu modesta artikolo.

### EKS-prezidanto

En 1987 la tiama eksprezidanto fariĝis prezidanto de EKS, la Esperanto-klubo de Stokholmo. Estis okazonta SEF-kongreso en Stokholmo, kaj kiel prezidanto de la komitato por la jubilea jaro, RL havis jam kontaktojn kun diversaj alt-ranguloj:

– Ĉar mi havis bonan kontakton kun Ingemund Bengtsson, la parlamenta prezidanto, oni pensis ke estus pli facile sur tiu nivelo, se mi

transprenus la taskon. Almenaŭ dum tiu jaro.

Bedaŭrinde Bengtsson malsaniĝis, do festparolis dum la kongreso Daniel Tarschys, popolpartia parlamentano, kiu iam lernis esperanton.

Tiutempe la estrarkunvenojn de EKS partoprenis 14 homoj, ĉar oni decidis, ke ankaŭ la anstataŭantoj ĉeestu, rakontas RL.

– Tio estas tro multe!

Nun ja ne plu estas tia problemo, eĉ al ĝenerala klubkunveno en la stokholma klubo malofte venas tiom da homoj.

### Ideoj

Roland Lindblom havas pripensindajn opiniojn pri estonta agado en Stokholmo:

– Estas necese dividi Stokholmon en pli malgrandajn pecojn, krei subgrupojn de EKS. Kaj trovi respondeculojn por diversaj kvartaloj.

– Kial la membroj ne venas al la EKS-kunvenoj en Brygghuset ĉiusemajne? Ĉar ili unue veturas hejmen, kaj poste unu horon al la centro, restas tie dum eble du horoj, kaj poste unu horon hejmen denove. Multaj ne vidas sencon en tio! Sufiĉas havi allogan programon unufoje monate.

Ĝenerale pri la ĉefurba klubo RL opinias:

– Mi pensas, ke ĉiu lando devas havi fortan, kaj eĉ iom prestiĝan, grupon ĝuste en la ĉefurbo. Ĉar tie troviĝas aliaj instancoj, kun kiuj ni ĉiam volas havi dialogon, se eblas.

### Tro malvasta pordo

Pridemandita, ĉu li kredas je la "Fina Venko", RL ne tute neas, sed respondas:

– Ne eblas manĝi elefanton, se oni ne dispecigas ĝin!

Nun venis jam la tempo por kafe, kaj la reprezentanto de *La Espero* povis manĝi pasto-rulon, ĵus bakitan de BooMee.

Post la pasto-rula ĝuado, la intervjuo povis rekomenciĝi. Roland:

– La pordo al esperanto estas tro malvasta. Se nun ni varbas 100 ho-

mojn, eble nur 10 fariĝas bonaj esperantistoj.

Post tio, ke oni reagis al varbmaterialo, montris sian intereson kaj volas lerni esperanton, oni devas ofte atendi, antaŭ ol komenciĝas taŭga kurso.

– Intertempe multaj ja perdas sian intereson.

Ne taŭgas atendi ekinteresi-tojn?

– Absolute ne!

Do jen kriza fazo. Alia kriza fazo, laŭ RL, venas post fino de porkomencanta kurso. Multaj volas tuj daŭrigi, sed ĉu troviĝas tiam daŭriga kurso? Ĉu entute ekzistas materialo por daŭrigontoj?

La taskoj estas evidente du – trakursigi kaj daŭrigigi la ekinteresi-tojn?

– Jes, kaj tial ni devas pensi pri la tuta fluo. Ne kontentiĝi nur per tio, ke ni eldonis iun varbmaterialon aŭ aranĝis iun kurson.

Ekinteresitoj devas esti tuj surhokigitaj, kaj por tio plej efikas la persona kontakto:

– Ni devas havi pretan aparaton – ne nur materialon sed ankaŭ lokajn respondeculojn.

RL ankaŭ serĉanoncas bonan materialon pri esperanto – svedlingve.

Kio estas "bona" materialo?

– Devas esti pli enhava, pli detala ol la nun ekzistantaj. Kaj devas sin pli rekte turni al la leganto.

### **Bona esperantisto**

Ĉu esperanto estas facila lingvo?

– Estas kiel ŝako. Oni povas rapide komenci ludi, sed por fariĝi ekvilibristo, oni bezonas longe studi kaj ekzerci.

Roland Lindblom opinias, ke esperantistoj devus aĉeti pli da esperantlingvaj libroj.

– Tio gravas, eĉ se ili poste ne legas la librojn, ĉar la aĉetado ebligas pluan eldonadon!

Do, jen estis jam parta respondo al la sekva demando: Kio estas bona esperantisto? Post ioma cerbumado venas jena respondo:

– Bona esperantisto devas havi internaciajn kontaktojn. Estas ja internacia lingvo. Oni devas praktiki, ĝui la fruktojn de siaj studoj! Ne su-

fiĉas nur ĉeesti siajn klubajn kunvenojn.

– Por tio ni ne bezonas milionojn da esperantistoj. Jam eblas uzi esperanton plurmaniere, trovi amikojn alilande.

Esperanto, diras Roland, samniveleligas homojn translime, povante malfermi pordon al la mondo.

*Ĉu vi jam aŭdis/legis pri*

# **ORDBYGGGE?**

Estas kajero pri la eblecoj de esperanto konstrui vortojn – farita kun la duobla celo sciivolemigi neesperantistojn kaj doni novan inspiron al iamaj komencantoj.

La prezo de "Ordbygge" estas nur 25 kronoj (inkl. sendkoston!). Mendebblas ĉe la verkinto, Jan Milld. Vi simple enmetas la sumon en la postĝiran konton **80 73 30 - 6**, menciante pri kio temas (ne forgesu vian propran adreson...).

o o o o o o o o

Krom "Ordbygge" ekzistas nun ankaŭ "Mer Ordbygge", temanta ĉefe pri la transitiveco aŭ netransitiveco de niaj esperantaj verboj.

Al ambaŭ "Ordbygge" kaj "Mer Ordbygge" troviĝas apartaj ekzerc-kajeroj.

Post "Mer Ordbygge" estas survoje tria kajero, "Ännu mer Ordbygge". Kaj ankoraŭ 4 Ordbygge-kajeroj estas planitaj. Povas esti, ke ili estas jam ĉiuj presitaj, kiam vi legas tiujn ĉi liniojn.

Por akiri la plej freŝan informon pri la situacio, por ekscii pri prezoj kaj mend-eblecoj – skribu aŭ telefonu al:

**Jan Milld**

**Solhemsvägen 21**

**137 40 Västerhaninge**

**0750/297 34**

**Jan Milld**

# Kiel aŭskulti esperantajn radioprogramojn

Ne ekzistas dubo pri tio, ke la radioprogramoj en esperanto estas tre bona ebleco ekzerci la lingvon kaj ricevi informojn pri diversaj landoj kaj kulturoj, do vere uzi la lingvon. Oni povas aŭskulti la programojn ekzemple kiam oni lavas telerojn aŭ la plankon. Radio-aŭskultado do ne estas tempo-raba afero, kiel ekzemple librelegado.

Aŭskultado de eksterlandaj radioprogramoj tamen ne estas senproblema. Multaj esperantistoj kaj aliaj rezignas pri tio, ĉar ili kelkfoje provis kun malbona rezulto. Tial indas atenti kelkajn konsilojn.

### Petu helpon

Se vi ne estas sperta pri radio-tekniko, simple turniĝu al iu el viaj parencoj, konatoj aŭ najbaroj, kompetenta pri radioriceviloj. Precipe intergejunuloj ĉiam ekzistas entuziasmaj radio-aŭskultantoj.

### Ekperimentu

Vi ekperimentu dum iu elsendo:

- Orientante vian tutan ricevilon
- Variigante la pozicion de la teleskopa anteno. (Por ricevi mallongajn ondojn estas konsilinde meti la antenon oblikve [snett])
- Dislokante la ricevilon interne de

la ĉambro (apud fenestro) aŭ de la apartamento (ekz. fluoreska lampo nete perturbas la ricevon)

- Kunligante la ricevilon kun la anteno de la televidilo
- Algluu sur la agordskalo paperostrion kaj signu sur ĝi la punktojn, kie vi ricevas la diversajn staciojn
- Komparu la kvaliton de la ricevo laŭ la diversaj frekvencoj; kie la ricevo estas pli bona, tie vi povas lasi la indikon
- Ne forgesu, ke karakterizaĵo de mallonga ondo estas la konstanta oscilado de la signalintenseco

# Esperanto kaj germana elstaras en Radio Polonia

Ĉiumonate la redakcioj de la fremdlingvaj programoj de Radio Polonia kreas statistikon pri la leteroj ricevitaj. Ordinare aŭ la esperanta aŭ la germanlingva redakcio ricevas la plej altan nombron, ĉirkaŭ 150–200 leteroj. El Svedio venas 10–20 leteroj monate. La plej multaj espe-


ranto-aŭskultantoj loĝas en Ĉeĥoslovakio, Germanio, Nederlando, Litovio, Latvio, Svedio, Britio, Finnlando, Estonio, Aŭstrio kaj Hungario laŭ menciita ordo. La statistiko pri la granda sukceso de la esperanto-redakcio montras, ke la esperantaj programoj estas pli sukcesaj ol

ekzemple la svedlingvaj, finnlingvaj aŭ anglalingvaj.

La ĉefredaktoro de la esperanto-redakcio, Andrzej Pettyn, komentas la statistikon:

– Post la paso de naŭ monatoj la svedoj okupas la sesan lokon, kiu estas tute bona, sed se ĉiuj aŭskultantoj ankaŭ pli ofte skribus al Pola Radio, certe Svedio estus inter la tri unuaj landoj. Estas interese, ke Litovio kaj Latvio superas Svedion. Ĉu surbaze de la statistiko oni povas juĝi la fortecon de la esperanto-movado en unuopaj landoj? Mi pensas ke ne, ĉar Hungario, kie la movado estas forta, okupas malaltan lokon.

La enhavo de la programoj estas bunta kaj interesa. Vidu la liston sur paĝo 75.



Malgorzata Wultanska kaj Anna Henn, la plej junaj redaktorinoj de la esperanto-redakcio de Radio Polonia



• Mezlonga ondo ordinare certigas bonan aŭskultadon nur post sunsubiro. Dum la tago oni povas aŭskulti nur la mallongajn ondojn

### Dratanteno

La ricevo de kurtondoj (*kortvåg*) povas esti rimarkeble plibonigita, se oni kunligas la ricevilon kun ekstera anteno. Sendube estus plej bone munti aŭ muntigi antenon sur la domtegmento; sed tio ne ĉiam estas ebla. Tial ni konsilas al vi kunligi dratantenon kun via ricevilo tiamaniere:

- Oni etendas kupran kaj kiel eble plej longan draton kun normala izolbendo en la ĉambro, aŭ prefere laŭlonge de eksterdoma muro.
- Poste oni kunligas la draton kun la eniro de la ekstera anteno de la ricevilo.

### Se ĉio ĉi ne sufiĉas

Kiam la ricevo estas aparte malfacila, la riceviloj, kiuj unue cedas, estas simplaj aŭ malnovaj. Oni pli bone sukcesos kun ricevilo nova kaj bone ekipita. Aĉetentate novan ricevilon, petu aparaton taŭgan por ricevi kurtondojn. Atentu ke diĝita (*digital*) frekvencelekto multe faciligas la serĉadon de frekvencoj. (*Prilaborita versio de "4 konsiloj por ricevi la Vatikanan radion" el revuo Radio Vaticana*)



## Sendu salutojn per la radio!

Per transsendo de salutoj kaj bondeziroj en la elsendoj de Radio Polonia vi povas fari plezuron al via samklubano, leteramiko aŭ alia samklubano. La servo estas senpaga. Vi do povas saluti al pluraj personoj. Eltondu, reskribu, aŭ kopiu la mendilon, kaj sendu ĝin al: **Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Varsovio, Box 46, Pollando.**

## Dags att prenumerera

Prenumerera på en eller flera esperantotidningar, så får du veta vad som händer i esperantovärlden och samtidigt tränar du språket. Priserna gäller för 1992. De priser som är märkta med \* kan komma att höjas i nästa nummer av **La Espero**, eftersom jag ännu inte fått svar på min förfrågan om de nya priserna.

<b>Bulgara Esperantisto</b>	12 nr/år	<b>110 kr</b>
<b>El Popola Ĉinio</b>	12 nr/år	<b>165 kr</b>
<b>Enigma</b>	6 nr/år	<b>130 kr*</b>
<b>Fonto</b>	12 nr/år	<b>130 kr</b>
<b>Heroldo</b>	16 nr/år	<b>150 kr</b>
(flygposttillägg 25 kr)		
<b>ICEM</b>	4 nr/år	<b>90 kr</b>
<b>Infana klubo, 1 ex</b>	11 nr/år	<b>50 kr</b>
2-4 ex samma adress		<b>30 kr / ex</b>
5-9 ex samma adress		<b>25 kr / ex</b>
<b>Juna amiko</b>	4 nr/år	<b>40 kr</b>
<b>Kontakto</b>	6 nr/år	<b>90 kr</b>
<b>Kulturaj Kajeroj</b>	4 nr/år	<b>80 kr</b>
<b>La Espero el Koreio</b>	6 nr/år	<b>65 kr</b>
<b>La Jaro</b>	årskalender	<b>27 kr</b>
<b>La Kancerkliniko</b>	5 nr/år	<b>120 kr</b>
<b>Letero de l' Akademio</b>	4 nr/år	<b>130 kr</b>
<b>La Ondo</b>	6 nr/år	<b>60 kr</b>
<b>Literatura Foiro</b>	6 nr/år	<b>165 kr*</b>
<b>Litova Stelo</b>	6 nr/år	<b>65 kr</b>
<b>Monato</b>	12 nr/år	<b>200 kr</b>
(flygposttillägg 45 kr)		
<b>Norvega Esperantisto</b>	6 nr/år	<b>70 kr</b>
<b>Oomoto</b>	2 nr/år	<b>60 kr*</b>
<b>Paco + Pacaktivulo</b>	5 nr/år	<b>95 kr</b>
<b>TEJO-tutmonde</b>	6 nr/år	<b>55 kr*</b>
<b>Scienca Revuo</b>	2 nr/år	<b>105 kr</b>
<b>Vietnamio</b>	4 nr/år	<b>65 kr*</b>

Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på **pg 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundets specialkonto, Hörby**. Ange vilka tidningar som avses. Förfrågningar angående tidningsprenumerationer kan göras hos: **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.**

### Mendilo por partopreno en la "Koncerto kun bondeziroj"

Adreso de la mendanto:

Bonvolu sendi en mia nomo saluto(j)n al: (precize kaj klare, sen mallongigoj estu skribitaj, nomo, antaŭnomo, adreso:

Kune kun la salutoj mi proponas laŭtlegi la jenan salut-tekston (ĝi estu mallonga):

Subskribo

# Radio Aŭstrio Internacia vigle eldonas

La esperanto-redakcio de la aŭstra radio ORF de post 1973 provizas siajn aŭskultantojn per interesaj programoj, en kiuj la semajna politika komentario lastatempe estis aparte aŭskultinda kaj interesa pro la okazaĵoj en orienta Eŭropo. La felietono enhavas informojn pri Aŭstrio, pri vojaĝoj, libroj ktp. La leterkesto enhavas respondojn de demandoj de aŭskultantoj.

La redakcio ankaŭ vigle eldonas. La eldonaĵoj tamen ne estas aĉetebaj, sed senkoste haveblaj kiel dancoj por leteroj de aŭskultanto. Ni povas mencii: *Porinfanoj poemoj*, *Aŭstria ŝtatprezidanto F. Jonas kiel esperantisto*, *Sentoj kaj agordoj*, *Kiom bone vi povas malstreĉi vin?*, *Bibliaj leteroj*. La eldonaĵoj estas premietoj por alskriboj, ĉar leteroj estas necesaj, por ke la redakcio eksciu pri la opinio de la aŭskultantoj pri la programoj.

## Pli ol 40 jaroj en Svislando

Jam en la dudekaj jaroj radio-stacio en Ĝenevo dissendis programojn en esperanto. En la vintro 1946/47 komenciĝis regulaj esperanto-programoj ĉe Svisa Radio Internacia en Berno. Preskaŭ dum la tuta tempo post la komenciĝo gedoktoroj Arthur kaj Heidi Baur ĉiusemajne prelegis pri la pasinta kaj nuna Svislando. Nuntempe gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond (jaŭde) kaj la redaktanto de *TEJO tutmonde* Andy E. Künzli (lunde) gvidas la programojn.

En 1991 ĝis aŭgusto la esperanto-fako ricevis 347 leterojn el 32 landoj, t.e. 2,9 % el la tuta SRI-korespondado.

**Raportoj ankaŭ pri la aliaj esperantaj radio-stacioj venos en venontaj numeroj de *La Espero*.**

# Esperanto en radio

Programoj aŭskulteblaj en Svedio. La informoj estos validaj ĝis la fino de aprilo 1992

Sveda tempo	Stacio	Frekvenco kHz
00.00-00.30 (Lu)	<b>La Habana</b>	11950; 15220
00.45-01.00 (Lu)	<b>Zagreb</b>	1143
00.55-01.00 (Ve)	<b>Vilnius</b>	666; 6100
01.25-01.30 (Ma)	<b>Vilnius</b>	11790; 13645; 15180; 15455; 15485
02.15-02.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	6125; 6135; <b>9650</b> ; 9885; 12035; 17730
04.15-04.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	6135; <b>9650</b> ; 9885; 12035
05.05-05.30 (Di)	<b>Wien</b>	<b>6155</b> ; <b>13730</b> ; 15410
06.40-06.55 (Ĵa)	<b>Vaticano</b>	1611; <b>6185</b> ; <b>7365</b>
6.45-07.00 (Me)	<b>Falköping</b>	90,8 MHz (Aŭskultebla nur surloke)
08.30-09.00 (Ve)	<b>Malmö</b>	89,2 MHz (Aŭskultebla nur surloke)
08.45-09.00 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	9560; <b>13685</b> ; 17670; 21695
11.20-11.30 (Di)	<b>Tallinn</b>	1035; <b>5925</b>
11.45-12.00 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	<b>13635</b> ; 15570; 17830; 21770
12.00-12.30	<b>Uppsala</b>	98,9 MHz (Aŭskultebla nur surloke)
14.05-14.30 (Di)	<b>Wien</b>	<b>6155</b> ; 11780; <b>13730</b> ; 21490
14.15-14.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	7480; 13635; 15570; 21695
14.30-14.45 (Lu/Ĵa/Sa)	<b>Bern</b>	3985; 6165; 9535
16.15-16.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	<b>13685</b> ; 15430; 17830; 21630
16.20-16.30 (Sa)	<b>Västerås</b>	92 MHz (Aŭskultebla nur surloke)
16.30-16.55 (Ĉiutage)	<b>Warszawa</b>	6095; <b>7285</b>
17.30-17.45 (Ĵa)	<b>Falköping</b>	90.8 MHz
18.15-18.30 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	9885; 11955; <b>15525</b> ; 17830; 21770
18.30-18.55 (Ĉiutage)	<b>Warszawa</b>	6135; 7285; 9540
19.30-20.00 (Di)	<b>La Habana</b>	11950; 15435; 17770
21.00-21.30 (Ĵa)	<b>Malmö</b>	90,2 MHz (Aŭskultebla nur surloke)
21.00-21.30 (Ve)	<b>Malmö</b>	89,2 MHz (Aŭskultebla nur surloke)
21.20-21.30 (Di)	<b>Vaticano</b>	1530; <b>6245</b> ; <b>7250</b> ; <b>11740</b>
22.00-22.30 (Ĉiutage)	<b>Beijing</b>	7470; 7405; 9965; 15225
22.00-22.20 (Sa)	<b>Roma</b>	7275; 9710; 11800
22.30-22.55 (Ĉiutage)	<b>Warszawa</b>	1503; 5995; 6095; 6135; 7270; 7285
23.00-23.20 (Di)	<b>La Habana</b>	15425; 17770
23.20-23.30 (Ĵa)	<b>Tallinn</b>	1035; <b>5925</b>
23.15-23.25 (Me/Sa)	<b>Bern</b>	9810; <b>9885</b> ; <b>12035</b> ; 15570

Informoj pri ŝanĝiĝoj estas bovenaj al la redaktanto de *La Espero*. La **dike** presitaj frekvencoj indikas la plej bone aŭdeblajn.

520-1710 kHz=Mezlongaj ondoj; 2300-2495 kHz=120 m; 3200-3400 kHz=90m; 3900-4000 kHz=75 m; 4750-5060 kHz = 60 m; 5959-6200 kHz=49 m; 7100-7300 kHz=41 m; 9500-9900 kHz=31 m; 11650-12050 kHz=25 m; 13600-13800 kHz=25 m; 15100-15600 kHz=19 m; 17550-17900 kHz=16 m; 21450-21850 kHz=13 m; 25670-26100 kHz= 11 m.

## Radio Pekino en 38 lingvoj

Radio Pekino disaŭdigas programojn en 38 fremdaj lingvoj, en la norma ĉina kaj en kvar ĉinaj dialektoj. La esperanta programo komenciĝis en 1964, Unue ĝi direktiĝis nur al Eŭropo, en 1965 komenciĝis programoj al Japanio, Koreio kaj sudorienta Azio, kaj en 1980 al Latinameriko. Nuntempe esperantaj programoj disaŭdiĝas ĉiutage.

La esperantaj programoj konigas la sintenon kaj vidpunktojn de la ĉina registaro pri gravaj internaciaj problemoj kaj ankaŭ raportas pri unuopaj ĉinoj kaj pri la esperanto-

movado en la lando kaj pri multaj aliaj temoj.

En la esperanta sekcio de Radio Pekino nun laboras kvin viroj kaj kvin virinoj. Tri parolistoj kaj tri parolistinoj aŭdigas siajn voĉojn el la programoj.



Redakcianoj de Radio Pekino

## Programoj kaj temoj

### Radio Aŭstrio Internacia

Semajna politika komentario, intervjuoj politikaj kaj ekonomiaj, aŭstriaj kulturraportoj, felietonoj, leterkesto.

### Radio Pekino

**Lunde kaj marde:** Vojaĝo en Ĉinio kaj Leterkesto. **Merkrede kaj ĵaŭde:** Ĉina kulturo. **Vendrede:** Muzika programero. **Sabate kaj dimanĉe:** Esperanto en marŝo kaj Literatura programero.

### Radio Polonia

**Lunde:** 16.30 Novaĵoj, el la gazetaro, kulturmagazino; 18.30 Novaĵoj, kalejdoskopio (i-a- revuo de Esperanto-revuoj); 22.30 Komentario, koncerto kun bondeziroj. **Marde:** 16.30 Novaĵoj, el la gazetaro, koncerto kun bondeziroj (resendo); 18.30 Novaĵoj, muzikmagazino; 22.30 Komentario, kalejdoskopio (r). **Merkrede:** 16.30 Novaĵoj, el la gazetaro, muzikmagazino (r); 18.30 Novaĵoj, kulturmagazino (r); 22.30 Komentario, Pollando hodiaŭ. **Ĵaŭde:** 16.30 Novaĵoj, el la gazetaro, polaj aŭ esperanto-temoj; 18.30 Novaĵoj, Pollando hodiaŭ (r); 22.30 Literatura elsendo. **Vendrede:** 16.30 Novaĵoj, el la gazetaro, leterkesto; 18.30 Novaĵoj, leterkesto (r); 22.30 Komentario, homoj kaj problemoj. **Sabate:** 16.30 Novaĵoj, el la gazetaro, homoj kaj problemoj (r); 18.30 Panoramo de internaciaj aventoj, esperanto-ekspreso; 22.30 La semajno en Pollando (r). **Dimanĉe:** 16.30 Pola temo, esperanto-ekspreso (r); 17.30 Pola temo, literatura elsendo; 22.30 Pola temo, esperanto-ekspreso (r).

### Radio Vatikana

Novaĵoj pri la katolika eklezio, religiaj programoj.

### Svisa Radio Internacia

**Lunde:** Svisaj kaj esperantaj temoj. **Ĵaŭde:** Svisaj kaj esperantaj temoj. **Sabate:** Ripetoj.

Informoj pri konstantaj programoj de aliaj radiostacioj venos.

## Tra la lando

### Vizito de Tanzanio

Constantine Mashauri ricevis stipendion por viziti junularajn organizaĵojn en Nordio. Dum kelkaj semajnoj li vizitis la kongresojn en Karlskoga kaj Bergen, la organizon Unga Ŝnara, infanvartejojn, EsperantoCentron kaj SEJU-renkontigon en Barnens Ö. Li ankaŭ uzis la tempon por studi esperanton, lingvo-instruajn metodojn, rutinojn en EC kaj ekonomion de organizoj. Plena programo!

### Kongreso de kristanoj

En julio okazis la 41-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en Vätterbygdens folkhögskola en Jönköping. Partoprenis 80 kristanaj esperantistoj el dek du landoj. I. a. la unuan fojon partoprenis baltoj en KELI-kongreso, nome tri estoninoj. Jam la unuan tagon la kongresa ĥoro komencis kanti sub gvido de paroĥestro Adolf Burkhardt el Germanio. La ĥoro kantis en Missionskyrkan dimanĉe kaj en muzika diservo en Ekhagskyrkan. Ĉiutage okazis matena kaj vespera preĝado, diskutoj, prelegoj kaj multaj ekskursoj. Karl Buremo, Britta Rehm kaj Arne Lundkvist multe laboris pri la kongreso. Venontjare la kongreso de KELI okazos en Hungario.

### Murdo en Esperantujo

Sub tiu titolo Suda Distrikto de SEF okazigis literaturan seminarion la 21-an de septembro en Malmö. Tri-dek personoj partoprenis. Inter ili estis kvar gastoj el Stralsund kaj ses danaj samideanoj. Ni estis gvidataj de Iva Åberg en la diversajn misterojn de la kriminala literaturo. Iva tre entuziasmigis la partoprenan-

tojn, kiuj eĉ mem verkis krim-ra-kontojn. Oni pritraktis kaj originalajn kaj tradukitajn verkojn. Dum la lunĉopaŭzo ni manĝis viandaĵon kaj pomkukon laŭ recepto de s-ino Mair-gret. Entute tre bona tago!

*Lisbet Andreasson*

## Ŝtelistoj en Esperanto-Centro

Okazis ŝtelenrompo en Esperanto-Centro. Iuj rompis la kelan pordon kaj forportis komputilon kun skribilo, kopiilon kaj novan telefaksilon. Ekestis paniko. Nia tuta membre-gistro estis en la komputilo. Tamen post kelkaj semajnoj la polico retrovis la komputilon. La asekurkompanio pagos la ceteron, krom 6 500 kronoj. Se ĉiu klubo pagus 150 kronojn, ni havus 6 450. Se ĉiu klubo varbus du novajn membrojn, ni havus 8 600 kronojn...

*Kaisa Hansen*

## Multaj ideoj en Falköping

La klubo en Falköping en majo organizis 60-jaran jubilean feston. La 18-an de oktobro ĝi partoprenis en karnavala procesio per reklama veturilo kiel la naŭa en la vico. Ĉirkaŭ 25 000 personoj vidis la reklamon laŭ la vojo. La 8-an de septembro la klubo partoprenis en korpokultura tago per reklamtabulo, afiŝado kaj aranĝis promenadon, kiun par-

Lättläst, spännande liten roman. 36 sidor för dig som vill läsa något utöver nybörjarboken!

**Dankon, Amiko!**  
*av Claude Piron*

45 kr

Esperanto-Centro  
Brunnsgatan 21  
111 38 Stockholm  
08-11 74 34

toprenis 476 personoj. En septembro ĝi aranĝis ekspozicion en la urba biblioteko.

*Ingvar Eriksson*

## Kluba ĝemeligo

Ĝemeliĝis la esperantokluboj en Dar-es-Salaam, Tanzanio kaj en Upplands Väsby, laŭ interkonsento la 21-an de aŭgusto 1991. Subskribis la decidon Ole Hansen kaj Costantine Mashauri. *La Espero* kun intereso atendas pliajn raportojn pri la kunlaboro.

## Tra la mondo

### Albanio eldonas revuon

Albana Esperanto-Ligo, kiu fondiĝis en marto 1991, nun komencis eldoni revuon. *Albana esperantisto* aperis per sia unua numero en julio. El ĝi ni ĉerpas kelkajn informojn: Klubo fondiĝis en Durres, Kukës kaj Tirana. Baldaŭ estos kluboj ankaŭ em Škoder kaj Korçë. AEL havas 226 membrojn kaj subskribis interkonsenton pri kunlaboro kun Makedonia Esperanto-Ligo. En Tirana Bardhyl Mezin, instruisto de matematiko, instruas esperanton al 18 gelemantoj 14-16-jaraj kaj al 11 instruistoj. Reeldoniĝos la libro *Gjergj Kastrioti Skenderbeg (1405-1468)*. *Nacia Heroo de Albanio*, unue aperinta en esperanto en 1967.

### ...kaj Ukraino

Kun ĝojo kaj ĝuo mi trafolumas numerojn de *Ukraina Stelo*, kiuj venis ĉi-jare al Esperanto-Centro. Tiu gazeto estas laŭ formato modesta, sed enhave tre riĉa, donante al legantoj el eksterlando bonajn sciojn pri la kulturaj, lingvaj kaj internaj okazintaĵoj en Ukraino. Oni ne nur rememorigas pri Ĉernobyl, sed prezentas ankaŭ poezion, diversajn ku-

## Stellan Engholm en NE

En *La Espero* 4/1991, p. 61, ni kontente raportis, ke nia nova sveda enciklopedio, *Nationalencyklopedin*, traktas esperanton per pozitiva informriĉa artikolo. Bo Sandelin en Landvetter atentigis la redaktanton de *La Espero*, ke ankaŭ nia sveda esperanto-verkisto Stellan Engholm ricevis propran rubrikon. Ni ĝojas, ke *NE* atentigas kaj priskribas ankaŭ la esperantan literaturon.

Lyssna på esperanto-musik!  
Ett urval aktuella kassetter:

**Folioj de mia memoro**

*Jomart kaj Nataŝa*

86 kr

**En la spegulo**

*Persone*

75 kr

**Festoj de kristnask'**

*Amplifiki*


50 kr

Esperanto-Centro  
Brunnsgatan 21  
111 38 Stockholm  
08-11 74 34

timojn (laŭ la sezonoj) kaj entute informas pri la lando mem. Belaj desegnaĵoj kaj sur la koverto kaj interne de la unuopaj ekzempleroj plaĉe kompletigas la tuton kaj altiras intereson tuj de la komenco.

("Ukraino" estas la korekta formo de la landnomo, vidu *LE* 2/1991, p. 24)

## La Akademio kaj ĝia revuo



Ĉu vi scias, ke ekzistas Akademio de Esperanto? Se vi estas individua membro de UEA, vi verŝajne legis en la jarlibro, ke la celoj kaj taskoj de la akademio estas:

1. Konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento kaj kontroli ĝian evoluon
2. Esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton.
3. Kritiki verkojn el lingva vidpunkto
4. Defendi Esperanton kontraŭ ĉiaj konkurencoj

En la lasta jarlibro vi povas ankaŭ legi la nomojn de la 37 akademianoj, inter kiuj troviĝas la svedo Christer Kiselman, kiu estas profesoro pri matematiko en Uppsala. Vi ankaŭ povas legi, ke troviĝas sekcioj pri teknika vortaro, gramatiko, ĝenerala vortaro, literaturo kaj prononcado, kaj komisionoj pri aproboj de fakaj terminaroj kaj pri landaj institutoj. Ni iom pli funde konatiĝu kun la akademio.

### Lingva Komitato

En la unua kongreso en Bulonjo, Francio en 1905 oni starigis Lingvan Komitaton kun 102 membroj el 26 nacioj. Ĝi baldaŭ montriĝis tro granda por efike labori. Tial jam

en 1908 oni formis Akademion de Esperanto, kiu konsistis el 18 el la membroj de la Lingva komitato. La lingva komitato ĉefe laboris pri eldonado de ses Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro.

### Post la milito

Post la dua mondmilito oni nur retrovis 48 el la membroj de la komitato. Tial oni reorganizis ĝin. De post la milito la Akademio konsistas el maksimume 45 membroj. La Lingva Komitato malaperis. La Akademio eldonis sepan Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro.

Nuntempe la Akademio laboras per i a publikigo de "Oficialaj informoj". Tio estas rekomendoj pri la lingvouzo. Aparte gravaj oficialaj informoj dum la lastaj jaroj estis la listo de normaj landnomoj kaj rekomendoj pri propraj nomoj. (Vidu LE 5/1989 kaj 2/1991).

La Akademio eldonas la revuon *La letero de l' Akademio de Esperanto*. Ĝi estas maldika (ofte okpaĝa) revuo, kiu aperas kvarfoje jare. Ĝi enhavas artikolojn pri lingvaj aferoj kaj demandojn de legantoj kun respondoj. Se vi volas aboni, rigardu paĝon 7 en tiu ĉi numero de *La Espero*.

## Ordboken svenska-esperanto

Manga har frągat vart ordboken tar vągen. I bŕrjan av 1991 rąknade Esperantofŕrlaget med att det skulle vara frągan om nągra mąnader innan den var fąrdigtryckt. Sista korrekturomgąngen var under arbete, och det fanns inte mąnga stavfel att rątta.

Arbetet med en ny ordbok ąr dock sądant, att ordfŕrrądet stąndigt vąxer och fŕrąndrar sig. Det visade sig naturligtvis, nąr rąttelserna kom, att det inte bara var rąttelser utan också fŕrbątrningar och ąndringar. I en bok pą 500 sidor ąr det ett stort arbete att fŕra in ąndringar – de mąste vara korrekt stavade, infŕrda pą rątt stąlle, och en ąndring pą ett stąlle kan medfŕra att nąsta ord mąste justeras, m.m.

Alla som arbetar med ordboken gŕr hela det hąr stora jobbet pą sin fritid. Det betyder att om det ordinarie arbetet krąver ŕvertid, są mąste ordboken vąnta. Det gąr inte att be nągon annan om hjąlp med delar av sąttningen av ordboken.

Derk Dam, som gŕr sąttningen, har fŕrt in rąttelserna till och med bokstaven U, och stŕrsta delen ąr alltsą gjord nu. Nągra tiotal frągor ąterstąr pą de redan rąttade avsnitten, och dem kommer Ebbe Vilborg att fą ta stąllning till są snart ŕvriga avsnitt ąr klara. Dąrefter ąr det dags att ta fram originalen.

Mer information om ląget kommer i samband med Esperantofŕrbundets konferens fŕr klubbordfŕranden i slutet av november, och i nąsta nummer av *La Espero*.

**Ulla Luin**

Vojąonta? Ne forgesu la jenan kajeron:

**Pasporta Servo  
1991-1992**

**60 kr**

Esperanto-Centro

# Sveda esperanto-teatro gastludis en Latvio en 1936

En jaro 1935, la latva gazetaro menciis gastadon en Latvio de svedaj aktoroj sub la gvido de reĝisoro Sandro Malmkvist. En Latvio tiutempe aperis gazeto *Ondo de Daugava*, kiu skribis, ke Rigon vizitis La Sveda Drama Esperantoteatro, organizita de la fama sveda reĝisoro Sandro Malmkvist. Relegante miajn notojn pri la esperantohistorio en Latvio, mi ne trovis, ke iu alia eksterlanda esperantoteatro antaŭ la dua mondmilito gastis ĉe ni. Eble mi eraras, nomante tiun teatron – same kiel *Ondo de Daugava* – esperantoteatro, ĉar mi trovis nek en *Enciklopedio de Esperanto* nek en *Esperanto en perspektivo* de I Lapenna la nomon de Sandro Malmkvist aŭ informon pri esperantoteatro en Svedujo.

Pri la aranĝoj de la prezentado, la svedojn helpis Latvia Esperanto-Societo, kiu petis respondecajn in-

stancojn permesi organizon de spektakloj. En petskriboj kaj respondoj oni skribis, ke al Latvio alvenas trupo el Gotenburga teatro. Spektakloj en Latvio okazis en tri urboj: la 7-an de majo 1935 en Riga, en la ejo de la Latvia societo, la 8-an de majo en Jelgava kaj la 9-an de majo en Liepaja. En la menciitaj urboj la svedoj prezentis al latvoj kaj la sveda kolonio en Riga du verkojn de Strindberg, svede *Ludi kun fajro* kaj esperante *Pasko*. La spektaklon apogis ankaŭ La Sveda-Latva societo de proksimiĝo.

Antaŭe svedaj esperantistoj vizitis la legacion de Latvio en Stokholmo kaj informis, ke kelkaj membroj de la Sveda Esperanto-Asocio vizitis Latvion kaj ke ili volonte establos kontaktojn kun latvaj esperantistoj. Sveda Esperanto-Asocio esprimis sian deziron, ke latvaj esperantistoj vizitu Svedion kun latva spektaklo kaj ke svedoj organizu

turneon tra Svedio. En Latvio estis kelkaj homoj, kiuj en libertempo volonte ludis teatron, sed ili ne veturis kun esperantospektakloj eksterlanden.

La gotenburga reĝisoro Sandro Malmkvist aranĝis spektaklojn en ĉiuj tri baltaj landoj. Antaŭ ol veni al Latvio, la grupo gastis en Estonio kaj poste en Litovio. Mi trovis dokumentojn, en kiuj niaj gastis estis prikomentitaj kiel la plej bonaj aktoroj de la Gotenburga Teatro. Tiuj sep estimataj gastoj estis reĝisoro Sandro Malmkvist kaj ses aktoroj: Eva Lagerström-Malmkvist, Ann Lindhagen, Verta Hall, Bengt-Åke Bengtsson, Karl-Arne Holmsten kaj Börje Mellvig.

**Alida Zigmunde**

La artikolo estis publikigita en la revuo de la klubo en Norrköping. Alida Zigmunde estas prezidanto de Centra Esperantoklubo en Riga.

Rimarkinde estas, ke tiuj ĉi konataj artistoj ludis teatron en esperanto.



El la feroa lingvo! Belega libro, ilustrita, maldika sed ĉarma:

**La filo**  
*de Marianna Debes Dahl*

68 kr

Originalaj poemoj de sveda esperantisto:

**Petaloj**  
*de Malte Markheden*

35 kr

Esperanto-Centro  
Brunnsgatan 21  
111 38 Stockholm  
08-11 74 34

## Esperanto-brakhologoj

### denove en stoko

### Revendistoj serĉataj

#### Mendu rekte de ni aŭ de via klubo peranto

Jack Snarberg IMPORT  
– reprezentanto por Skandinavio –  
Johan Skyttes väg 15,  
S-554 48 Jönköping,  
Telefono 036-11 37 99  
Poŝtgiro: 25 23 62-9

# Sankta Nikolao komprenas esperanton!

Dum mia somera vojaĝo tra Finnlando, mi havis eblecon viziti la sidejon de la finna **Joulupukki**, kiun en la mondo oni konas laŭ la nomoj Santa Claus, Sankta Nikolao k.s. Joulumaa aŭ Santa Claus Land, alivorte la Sankta-Nikolaolando (Sankt-Nikolaiujo?) troviĝas 10 kilometrojn norde de Rovaniemi, tute precize ĉe la polusa cirklo. Apud la granda ligna konstruaĵo videblis amaso da aŭtoĉaroj kaj ordinaraĵoj aŭtomobiloj, ĉie infanoj, ofte akompanate de plenaĝuloj. Mi eniris la konstruaĵon kaj tuj ekŝajnis al mi, ke mi eniris fabellandon. Bela ligna internaĵo, amaso da koloraj ornamaĵoj, butikoj kun ludiloj kaj ie flanke, longega atendovico, en kiu trankvile staras plejparte infanoj. Jen ili atendas por eniri la oficejon de Joulupukki, vidi lin de proksime kaj eble eĉ ricevi donaceton. Post mallonga atendado kune kun miaj amikoj Kalervo kaj Rainer (fotistoj), mi eniris la ĉambron kaj tuj funkciiginte la magnetofonon, mi alparolis la estimindan barbulon.

– Kara Joulupukki, akceptu tutekorajn salutojn, kuĵn mi kuportas



en la nomo de esperantistaj infanoj.

– Dankon, dankon!

– Kion vi volus diri al la infanoj de la mondo pere de esperanto-gazetoj kaj esperantlingvaj radioelsendoj?

– Unue mi transsendas varmkoran saluton de mia sidejo ĉe la polusa cirklo al la infanoj, kie ajn ili loĝas. Mi deziras al vi, ke okaze de la proksimiĝanta Kristnaskofesto vi ricevu belajn donacojn kaj ke realiĝu viaj plej personaj revoj. Mi mem, kompreneble, faros mian eblon por helpi vin, sed mi kutimas helpi nur ĝentilajn infanojn, do nepre estu obeemaj al viaj gepatroj kaj instruistoj kaj al ĉiuj, kiuj zorgas vin.

– Mi scias, ke vi ricevas ĉiujare amason da leteroj, al kiuj vi respon-

das helpade de viaj sekretarioj. El kiuj landoj venas plej multe da korespondadoj?

– Mi havas geamikojn en la tuta mondo kaj korespondadoj venas el pli ol 150 landoj, sed ekzemple en la pasinta jaro entute venis pli ol duonmiliono da korespondadoj, plej multe el Finnlando, pli ol 100 mil, la dua estis Japanio, ĉirkaŭ 90 mil, la tria Pollando, pli ol 50 mil. tuj poste sekvis diversaj respublikoj de Sovetunio kune, poste Italio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Germanio ktp.

– Ĉu venas leteroj en Esperanto kaj ĉu vi konas ĉi tiun lingvon?

– Mi devas kompreni ĉiujn lingvojn, do ankaŭ Esperanton, sed laŭbezone helpas min miaj sekretarioj. Jes, venas leteroj en Esperanto, sed ni ne faras apartan statistikon, almenaŭ ĝis nun ni ne faris, kvankam tio estus ebla.

– Mi certigas vin, ke ĉi-jare vi povos apartigi esperantistojn en la statistiko, ĉar ĉe via adreso ili skribos la vorton "ESPERANTO". Refoje akceptu saluton, ni deziras al vi bonan kunlaboradon kun infanoj kaj bonan buĝeton, por ke neniam manku al vi mono por donacoj.

– Dankon! Bonvenon al mia sidejo apud Rovaniemi kaj varmkoran saluton al la tutmonda infanaro.

**Andrzej Pettyn**

*La teksto estas antaŭe sendita kiel programo de Radio Polonia.*

Se vi, aŭ iu infano konata de vi, volas ricevi koloran respondleteron de Sankta Nikolao, skribu al li laŭ la adreso:

**Joulupukin posti  
Napapiiri  
ESPERANTO  
SF-96930 Rovaniemi  
Finnlando.**

Ne forgesu pri la vorto "ESPERANTO", por ke la leteroj de esperantistoj estu kalkulitaj aparte.

## Etimologia vortaro de Esperanto

**Volumo 1, A–D**

**81 kr**

**Volumo 2, E–Ĵ**

**95 kr**

Esperantoförlaget  
Box 7502  
200 42 Malmö  
040-12 20 29

Esperanto-Centro  
Brunnsgatan 21  
111 38 Stockholm  
08-11 74 34

Gravaj tekstoj de Gaston Waringhien, aŭtoro de *PIV*: pri "pra-esperanto", pri lingvaj problemoj, kaj pri la perspektivoj de esperanto. La libro estas verkita en 1959, nun la dua reviziita eldono:

**Lingvo kaj vivo  
de Gaston Waringhien**

**Jubilea kolekto n-ro 3**

**260 kr**

Esperanto-Centro  
Brunnsgatan 21  
111 38 Stockholm  
08-11 74 34

# Por komencantoj

## Moralajo

En la sekva alineo (*stycke*) vi povos legi modelon de miloj (*tusentals*) da anoncoj publik-ig-it-aj ĝis promsimume la mezo de la 19-a jarcento (1800-talet) p.K (=post Kristo), en la ĵurnaloj ĉefe en Usono kaj Brazilo, kie ekzistis milionoj da negro-sklavoj. Bonvolu, do atenti:

"Mi vendas sklavon altan kaj fortan, kun dentaro ne-difekt-it-a, proksimume 30-jaraĝa, lerta por kampaj laboroj. Alia, pli juna, bona kuiristo (*kock*). Aŭ mi ilin interŝanĝas kontraŭ du sklavinoj bel-aspektaj".

Ni, kiuj vivas en la lasta jardeko de la 20-a jarcento p.K. legas tion kaj sentas indignon. Sed legu nun, kio

publik-iĝas en niaj ĵurnaloj nuntempe. Bonvolu atenti:

"Kaŭze de la krizo multaj infanoj mortas ĉiutage en la mondo, ĉar ili malsufiĉe nutriĝas. Abundas la nutraĵoj sed milionoj da homoj ne en-spezas (*tjåna*) la necesan monon aŭ estas sen-labor-uloj kaj ne povas aĉeti tion, kio estas bezonate por viv-teni siajn infanojn".

Kaj apud tiu sci-igo kaj aliaj similaj, vi trovas jenen tekston:


"Donu bonan manĝon al via hundo! Ĉio, kion hundoj bezonas por kreski al sanaj kaj fortaj estaĵoj (*varelse*), troviĝas en la manĝaĵo, kiun ni produktas. Petu ĝin en ĉiuj nutraĵvendejoj".

**Moralajo:** Ni ne kondutas pli bone ol niaj antaŭuloj, sed ni ne konscias pri tio.

A Lopez Luna

Represita el SLEA-informilo 4/1991

## Krucvortenigmo



### Horizontale:

1. Post nokto – Spec' de homo
2. Ĉefurbo en suda Eŭropo – Rabobird'
3. Organ' – Rostita pantranĉaĵo
4. Fea mingardisto – Brutej'
5. Sufikso de participo – Protekto kontraŭ riskoj
6. Retret' – Fiŝkaptilo
7. Astr' – Adverbo por emfazi
8. Laŭnoma sed ne efektiva
9. Impresas al nazo – Vendotaj'
10. Formo de molekulo – Kultobjekta

### Vertikale:

- A. Graso por pano
- B. Observeme – Lirika poem'
- C. Formo de gardo – Doktrinon
- Ĉ. Prepozicio – Suferinto de kruelaĵoj
- D. Enmemorigos – Malekstera
- E. Malrifuzi eniron
- F. Bukeda
- G. Kolektus fojnjon – Nephavanto
- Ĝ. Ritotabloj – Prepozicio
- H. Postlaso de filozofo – Bonega

Kompilis: Lennart Persson

## Ĉe danca vespero

Junulo diras al junulino:

– Mi legas viajn pensojn, ĉar vi estas kvazaŭ malfermita libro.

– Legu do, mi petas, sed ŝajnas al mi ke vi tro multe karesas ĝian kovrilon.

El Albana Esperantisto 1/1991

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	K	A	N	T	I	S	T	I	N	O
2	S	T	A	R	T	O		N	E	E
3	I	L	I	A		D	E	K	O	R
4	L	E	N	S		O	V	O	L	O
5	O				E	R	M	E	N	O
6	G		K	R	E	O	N		G	
7	R	A	N	Ĉ	A		T	E	I	N
8	A	R	E	O	L	O		T	S	E
9	F	A	L	S	A	N		E	M	A
10	O	N	O		N	I	M	R	O	D

Solvo de la enigmo en *La Espero* 4/1991



# Du novaj muzikkasedoj

*Ĵomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaĥ: Folioj de mia memoro. Eldona Societo Esperanto. Malmö 1990. Muzika kasedo. 45 minutoj. 86 kr.*

Ĉu ekzistas tipa sovetia muzikstilo? Nuntempe, kiam Sovet-Unio pli kaj pli multe disfalas, multaj okcident-eŭropanoj lernas, ke en Sovetio loĝas pli ol cent popoloj kun tre malsamaj kulturoj. Jes, mi dirus tre malsamaj, sed ne tute malsamaj. La stilon de Ĵomart kaj Nataŝa mi bone rekonas de mia unu- kaj duonjara loĝado en Sovetio. Gejunuloj kun gitaro ĉie kaj ĉiam kune kantas pri amo, amikeco kaj ĉiutagaj aferoj, pri la vivo mem. Rusa pasio spicas la kantojn, tiujn de la gejunuloj kaj tiujn de la profesiaj kantistoj. La kanzonojn akompanas sola gitaro sen orkestro. Dum la pasintaj jardekoj kreskis forta kanzona tradicio en la sovetia esperanto-movado. Ĉar tiu movado dum longa tempo estis izolita, tiu tradicio estas tro nekonata ĉe ni. Tial ni kun ĝojo bonvenigas tiun ĉi kasedon kuna 19 originalaj kantoj de Ĵomart Amzejev el Kazahio, prezentitaj duete kun Nataŝa Gerlaĥ.

La kantoj estas ĝuindaj por ĉiuj aĝoj, kaj gejunuloj kaj pensiuloj.

**Leif Nordenstorm**

*Amplifiki: Festoj de Kristnask'. Stockholm 1990. 50 kr.*

Ek de la komenco en 1984, la ensemble Amplifiki plurajn fojojn aperis kun novaj anoj. La gitaristo kaj bandestro Mikke Englund nuntempe estas la nura veterano.

Kvankam la anaro ŝanĝiĝis, la muzikstilo restas konata – pop- kaj rokmuziko, kiun multaj esperantistoj, precipe junaj, rapide ekŝatis. Sed per la kristnaska kasedo ili sur-

prizis min. Neniu el la kantaĵoj estas roka. Kelkajn mi nomus popo, sed aliaj estas multe pli trankvilaj, kaj la ĉefa impresado estas la jula etoso, kiu vibras tra la tuta kasedo. Jen kristnaskaj tonoj por la tuta familio.

La kasedo enhavas ĉirkaŭ tridek kvin minutojn kun ok kantaĵoj kaj du mallongaj interludoj. Mikke verkis tri pecojn. Ĉiuj fakte temas pri soleco dum kristnasko, sed unu estas pli amuza ol melankolia: "Sankta Nikolao, kunportu inon en la sako via" (!). Mia plej ŝatata estas *Ĉe la rando de l' ŝose'*, kie Mikke trovas sin petveturanta en norda Italio la 24-an de decembro. La klavaristo Juhani Haavisto ankaŭ kontribuis kiel komponisto. Temas pri *Venu sankta nokt'*, kun senvorta sed plorige bela koruskantado de la muzikaj gastoj Ĵomart Amzejev kaj Nataŝa Gerlaĥ.

Krom la originale verkitaj kantaĵoj, vi trovos kompreneble ankaŭ tradiciajn kaj konatajn kristnaskajn melodiojn. Mikke tradukis fidele la kanton *Meznokt' regas* kaj *tre libere alian, Stel' de l' dezir'*, konatan almenaŭ por ĉiuj svedoj kiel kristnaska kanto (*Ser du stjärnan i det blå...*). Kelkaj kantaĵoj vere estas neatendite aranĝitaj; precipe interesaj mi trovis la du pecojn *Sledveturado* kaj *Sankta nokt'*. En tiu ĉi lasta la drumado de Olle Bergius estas sugestia. Ĝenerale la muzikistoj laŭ mia juĝkapablo estas lertaj kaj inventemaj. La aranĝojn ili faris kune. Ankoraŭ ne menciita estas la basgitaristo Bobbi Björklund.

Tre grava por la impresado de la kantaĵoj estas la kantisto. Per Ola Axelsson tre klare evoluigis sian voĉon de post la antaŭa kasedo de Amplifiki. Li malstreĉiĝis kaj ĝi fariĝis multe pli bela, foje rava. En *Sankta nokt'*, li kaj Nataŝa anĝelkorusas.



Vår käre

**GUNNAR LARSSON**

\* 31 december 1906

har idag stilla insomnat  
i ljusst och tacksamt minne  
bevarad

Stockholm – Vansäter  
8 oktober 1991

Aina, Astrid  
Erik och Anny  
Ruben och Birgitta

\*

Syskonbarnen med familjer

\*

Vännen Greta

*Det är vackrast när det skymmer  
all den kärlek himlen rymmer  
ligger samlad i ett dunkelt ljus  
över jorden, över markens hus.*

Begravningsakten äger rum i  
Hoppets kapell, Skogskyrkogården,  
Enskede, fredagen den  
8 november 1991 kl. 14.30.

## Martin Sæther,

kiu naskiĝis en Norvegio la 19-an de julio 1920, mortis en Lund la 16-an de oktobro 1991. Li estis unu el la veraj idealistoj kaj li en diversaj medioj batalis por la monda paco. Li frue komprenis la valoron de Esperanto en tiu batalo kaj li apartenis al la estraro de la suda distrikto de SEF, kaj ankaŭ al la estraro de la Esperanto-klubo en Lund.

Ni klubanoj profunde sentas la foreston de Martin, kaj en la kluba vivo kaj en la amika rondo.

**Sven Strandberg**

Prezidanto de la Esperanto-klubo de Lund

*Festoj de Kristnask' aperis en decembro 1990, iom malfrue por tiu julo. Sed ĉi-jare restas sufiĉe da tempo por ekzemple sendi la kasedon al eksterlandaj leteramikoj, kiel mi intencas fari. Feliĉan kristnaskon kun Amplifiki!*

**Kajsa Larsson**

**P.S. Lastminuta informo:** Amplifiki de nove laboras en studio. La nova kasedo nomiĝos **Ĉu ne?! Tenu la orelojn malfermitaj...**

## Politika skizo de amata prezidento

**Urho Kekkonen: La finna vojo.** Elfinnis: Osmo Buller. Oy Mendoservo Ab. Finnlando 1990. 109 p.

Tiu ĉi libro de la jam dum sia vivo legenda finna prezidento Urho Kekkonen nun aperis en esperanto. Laŭ la finna konstitucio, la prezidento respondecas pri la ekstera politiko de la lando. Tio donis al Kekkonen grandegan influon pri la internaciaj rilatoj de sia lando. Aparte malfacila tasko por Kekkonen estis la rilatoj kun Sovet-Unio, lando, kontraŭ kiu Finnlando dufoje militis. Lerte la prezidento sukcesis aranĝi ekonomian kunlaboron, favoran por ambaŭ nacioj, sen dependigi sian landon de la granda najbaro.

En sia libro Kekkonen aparte traktas la rilatojn inter Finnlando kaj Sovet-Unio, sed ankaŭ la rolon de Finnlando en Nordio, Eŭropo kaj en la mondo. Aliaj temoj estas rilatoj inter Finnlando kaj evolulandoj, komerca politiko, ekstera politiko kaj popolopinio, politiko kaj neŭtraleco. *La finna vojo* estas aparte interesa legaĵo nun, kiam orienta Eŭropo fariĝis ĉiutage priparolata afero. La traduko estas flua kaj la preso bonkvalita. Granda manko estas nur, ke ne ekzistas tia libro pri la modernaj historio kaj politiko de ĉiu lando.

**Leif Nordenstorm**

# Lingva perfektigo per novaj ekzerciloj kaj krestomatio

**William Auld (red.): Nova Esperanta Krestomatio. Jubilea Kolekto 5.** UEA. Rotterdam 1991. 509 p. 305 kr.

Laŭ la redaktinto la tri ĉefaj celoj de *Nova Esperanta Krestomatio* (NEK) estas: prezenti tekstojn lingve modelajn, prezenti tekstojn aktuale interesajn sed ankaŭ el tiu aŭ alia vidpunkto daŭre valorajn kaj prezenti modestan superrigardon de la reala kulturo de la internacia lingvo, por ke la lernanto plivastigu sian komprenon pri la dimensioj de tiu kulturo. La pli ol kvincentpaĝa libro enhavas rakontojn de malnovaj kaj modernaj esperanto-verkistoj kaj ĉapitrojn el tradukita mondliteraturo, kiuj kune atestas pri tio, ke esperanto havas riĉan literaturon tradukitan kaj originalan. La popularsciencaj artikoloj estas lerte elektitaj, ĉar same kiel krimromano ili kaptas la intereson de leganto. Povas temi pri marĉevalo, pri la perdita kaj retrovita Pompejo aŭ pri aliaj temoj. Inter la dek unu prilingvaj artikoloj troviĝas kelkaj tre gravaj artikoloj, kiujn devus esti legintaj ĉiuj seriozaj esperantistoj. Temas i. a. pri *Mitaj faktaj pri Esperanto* de William Auld kaj *Psikologiaj reagoj al Esperanto* de Claude Piron. La laste menciita klarigas neraciajn reagojn de homoj, kiuj ricevas informojn pri esperanto. Krome NEK enhavas ankaŭ 141 paĝojn da originala kaj tradukita liriko.

Sendube NEK estas valora kaj enhavoriĉa libro, sed por kiu? "Krestomatio", laŭ PIV, estas "kolekto da prozaj kaj poeziaj pecoj, kompilita laŭ pedagogia instrua vidpunkto", disde "antologio", kiu estas kompilita laŭ beletra vidpunkto. Laŭ tiuj ĉi difinoj mi iom dubas, ĉu NEK vere estas krestomatio. La enhavo ne estas aparte facillingva. Do NEK estu uzata nek en komencantula kurso, nek en kurso por progresantoj, kiuj

ankoraŭ ne scias legi normalnivellan beletron.

Por ĉiu esperantisto, kiu jam finis la unuajn kursojn, kaj atingis tian nivelon, ke li povas legi beletron, kaj kiu volas sisteme konatiĝi kun diversaj esperanto-verkistoj kaj kun la esperanta kulturo, NEK tamen estas utila. Li ne benozas aĉeti tutan libraron, ĉar NEK estas la unua gvidlibro tra la esperanta literaturo.

**Leif Nordenstorm**

**Andrzej Pettyn: Ĉu vi parolas Esperante? Teksto por sonbendoj.** Oy Mendoservo AK, Kivistöntie, SF-05 510 Hyvinkää, Finnlando.

En vico de multaj lernolibroj venas nova libreto kun du C-60 sonkasedoj, verkita de Andrzej Pettyn. Ĉi tiu lernolibro ne estas por komentantoj, sed por tiuj, kiuj iam lernis sed tamen bezonas korekti sian elparolon.

Multaj el ni, kies scioj pri esperanto baziĝas plejparte sur memstudoj hejme kaj kies eblecoj aŭskulti kaj paroli Esperanton estas minimumaj, bezonas sonbendon, kiu ne nur instruas prononcadon de apartaj vortoj kaj mallongaj frazoj, sed ankaŭ prezentas pli longajn dialogojn, en kiuj frazmelodio ludas tre gravan rolon. La sonbendoj apartenantaj al la lernolibro *Ĉu vi parolas Esperante?* prezentas bonegan eblecon aŭskulti belan lingvajon hejme. Unu el la avantaĝoj de ĉi tiuj sonbendoj estas, ke pluraj personoj, ne nur unu aŭ du, surbendigis la dialogojn. Pro tio la dialogoj estas naturaj, same kiel en la ĉiutaga vivo.

Mi volonte rekomendas ĉi tiun lernolibron kun kasedoj.

**Aira Kankkunen**

Jan Milld: **Ordbygge**, Stockholm 1991, 60 sid, 25 kr, samt **Mer Ordbygge**, Stockholm 1991, 44 sid, 20 kr. Övningshäften 5 kr respektive 4 kr.

Det finns en sorts esperantister som ser på esperanto med samma klåfingriga ögon som en meccanopojske betraktar sin senaste bygglåda. Bitar som de inte hittar eller som inte passar byter de ut, gör om eller hittar på utan den respekt man normalt har för ett *levande språk*.

Jag blev därför något misstänksam när jag läste de första orden i JM:s *Ordbygge*: "Esperanto är inte som andra språk. Esperanto är ett system av byggklossar, som kan kombineras."

Innehållet i häftena lugnade mig dock. JM har respekt för det faktiskt levande språket. Häftena ger inspiration och exempel på hur man med för- och efterstavelser m.m. kan formulera sig både fyndigt, elegant, klart och koncist på esperanto. Här finns både vanliga, välbekanta ord (som *alivorte*, *tro-simpligi*) och sällan hörda uttryck (som *vanguŝiga*, *limakado*, *trafadenu*). Förklaringar och tolkningar är på svenska.

JM:s förklaringar är i första hand enkla och korta, vilket i stort sett är av godo, även om de ibland brister i exakthet och fullständighet (t. ex. vad gäller användningen av *-igi*, *-igi* och *-ado*). Någon gång föreslås ord som är så sammansatta att de liknar en parodi på esperanto (dolĉajemulino, bonhumorigadi, apudstarintaro, etc.). Man behöver ju inte som grönländare pressa in en hel novell i varje ord! I något fall har JM förbisett det vanliga sättet att uttrycka en sak och föreslår t. ex. "enterigejo", "monavidanto", "plivastiĝi" i stället för *tombejo*, *avidulo*, *disvastiĝi*. Några slarvfel finns också, t. ex. "finigi" (*fini*), "rapidiĝi" (*rapidi*). Detta förtar dock inte huvudintrycket, som är positivt. Jag rekommenderar häftena för dig som vill berika ditt aktiva ordförråd, öka ordglädjen och vänja dig av med att tänka på svenska och sedan översätta ord för ord till esperanto.

Sten Johansson

## Por radioaŭskultantoj

**World Radio TV Handbook**. 1991 Edition. Amsterdam 1991. 576 p.

Tiu ĉi anglalingva libro estas valorega helpilo por tiu, kiu volas aŭskulti diverslandajn radioprogramojn. Oni facile trovas ĉiujn radiostaciojn, frekvencojn kaj tempojn por en-kaj eksterlandaj programoj kaj multajn aliajn utilajn informojn.

Ordinare WRTH sur unu paĝo aparte listigas ĉiujn esperantlingvaj elsendojn. Ĉi-jare tiu listo mankas, verŝajne pro spacomanko.

Leif Nordenstorm

## Naiva venĝanto

Eduard Bornhöhe: **Venĝanto**. El la Estona: Valev Kruusalu. Mendoservo, Hyvinkää 1990, 118 p.

En 1343 estonaj kampanoj ribelis kontraŭ danaj kaj germanaj feŭdaj sinjoroj. En 1880, dum estona nacia vekiĝo, EB publikigis ĉi tiun romanon kun temo el tiu epoko. La historia romano simple kaj romantike esprimas idealismon, ĉefe la valoron de nacia sendependeco, parte ankaŭ de socia justeco. Mankas psikologie trafaj personaĝoj. Ĝia valoro

ne estas literatura, sed ĝenerale kulturpolitika; ĝi estis – siatempe, kaj eble eĉ en nia epoko – simbolo de memestimo, fiero kaj obstino de malgranda subpremata popolo.

Por okcidenta leganto ĝi ŝajnas iom tro simili leĝerajn rakontojn de distraj magazinoj. Tamen ĝi eble povas vekti pensojn pri perforta aŭ senperforta rezistado, precipe se oni komparas kun la aktuala evoluo en Baltio kaj aliloke.

La lingvo de la traduko estas bona, glata kaj simpla, kaj bone respiegulas la naivan rakonton. Nur malofte troveblas nekutimaj esprimoj, ekz. "apenaŭ ne" en la signifo de "preskaŭ", aŭ "la knabo restis sidi".

La libron ornamas desegnoj de Marike Laht, en stilo, kiu pensigas min pri ilustraĵoj de Kalevala.

Sten Johansson

Konatiĝu kun la  
esperanta literaturo!

**Nova Esperanta  
Krestomatio**  
(red. William Auld)

Jubilea kolekto n-ro 5


305 kr

Esperanto-Centro  
08-11 74 34

## SEF KONGRESO de Esperanto



22-24  
majo  
1992



Oskarshamn

Skicka inte brev  
utan  
kongressmärken!

Beställ genom  
pg-konto 481 43 95-2  
SEF-jarkongreso  
c/o Tore Johansson

Pris inkl. porto:

8 st	15 kr
16 st	20 kr
32 st	35 kr
Vykort	3 kr

Sten Svenonius  
Erikstorpsg 26 A  
21754 Malmö

Esperantoförbundet, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm

## Medlemsavgifter 1992!

### Medlemsavgift till SEF

Nu är det dags att betala medlemsavgiften till Esperantoförbundet för 1992. Ni som är anslutna genom någon esperantoklubb betalar som vanligt till klubbens kassör.

Ni som är direktanslutna till förbundet betalar 135 kronor (ungdomar t o m 20 år och familjemedlem utan tidningen *La Espero*: 60 kronor). Betala till Esperantoförbundet, pg 20 12-3. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte skulle få den, meddela ditt födelseår på postgirotalongen.

### Medlemsavgift till UEA

Som direkt medlem i UEA ger du världsförbundet ett extra stöd, samtidigt som du själv får en del förmåner, t ex nedsatt kongressavgift för kategorierna MJ, MA och DM. UEA arbetar nu för att komma upp i 9000 direkta medlemmar 1991 och 10 000 medlemmar 1992. Vi svenskar har råd att gå med.

#### Agifterna för 1992:

<b>MA</b>	Medlem med årsbok och tidskriften <i>Esperanto</i>	290 kr
<b>MJ</b>	Medlem med årsbok (ungefär 400 sidor)	115 kr
<b>MG</b>	Medlem med <i>Gvidlibro</i>	50 kr
<b>SZ</b>	Societo Zamenhof, för den som vill ge UEA ett extra ekonomiskt stöd. (Medlemskap ingår ej.)	580 kr
<b>PT</b>	Patrono de TEJO, stöd till ungdomsförbundet TEJO, <i>Kontakto</i> och andra TEJO-trycksaker ingår. (Medlemskap ingår ej.)	345 kr
<b>DM</b>	Livstids medlemskap med livstids prenumeration på årsboken och <i>Esperanto</i> .	
	Om avgiften betalas in före 1991-12-31	6250 kr
	Om avgiften betalas in efter 1992-01-01	7250 kr


Den som ännu inte fyllt 30 år 1 januari 1992 och blir medlem i någon av kategorierna MJ, MA eller DM får även *Kontakto* och *TEJO-tutmonde*. Ange därför födelsedatum.

Avgiften kan betalas in på pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser. Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

## SEF KONGRESO de Esperanto



22-24  
majo  
1992



### Oskarshamn

#### SEF-kongress i Oskarshamn

Information om Svenska Esperanto-förbundets kongress 22-24 maj 1992 kommer i nästa nummer av *La Espero*.

### 100 jaroj en Uppsala

La Esperanto-klubo en Uppsala festos sian centjaran jubileon la 14-an de decembro 1991.

#### Festu kun ĝi!

Informoj pri tempo kaj loko:

**Yngve Nilsson,**  
tel: 018-32 75 97

**Guy Coste,**  
tel: 018-25 13 29